

Unesko-Kuriero aperis en Esperanto

■ Trezoro Huang Yinbao

Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de Unesko (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Ĝi ekaperis en 1946. Kiel grava komunikilo por disvastigi la ideojn de Unesko kaj promocii la interkulturajn dialogojn, la revuo iam ludis gvidan rolon por disvolvi la misiojn de la internacia organizaĵo en la kampoj, pri kiuj ĝi respondecas.

Dum la pasintaj jardekoj multaj esperantistoj alvokis, ke Unesko eldonu la revuon *Unesko-Kuriero* ankaŭ en Esperanto. La konata aktivulo alvokis por inundi Uneskon per petoj, ke Unesko komencu eldoni ĝin ankaŭ en Esperanto. Laŭ sia alvoko esperantistoj sendante al Unesko amason da retaj mesaĝoj, ĝenis la funkciojn de Unesko, kiuj multfoje plendis al UEA pri proponoj de individuaj esperantistoj pri oficialigo de Esperanto, ĝia instruado, eldonado de Esperanta versio de Unesko-kuriero. En la jaro 2000, laŭ la postulo de Unesko, la tiama ĝenerala direktoro rete publikigis malferman leteron por haltigi la agadon. En la malferma letero Osmo Buller skribis: *“Dum la pasintaj jardekoj UEA jam plurfoje diskutis pri la sama ideo kun respondeculoj de Unesko. Kvankam ŝanĝiĝis la respondeculoj, la respondo restis la sama: se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de Unesko-Kuriero.”* (el *Eventoj*, n-ro 182, 2/marto-2000.)

Post lia alvoko oni ĉesigis la mesaĝan bombadon al Unesko. Multaj

esperantistoj konsciis ke la Esperanta *Unesko-Kuriero* estus ege valora revuo, per kiu ni povus montri al la mondo ke Unesko subtenas Esperanton. Bedaŭrinde la Kuriero devige ĉesis ekde 2012 pro manko de financaj rimedoj. Ekde tiam malaperis la penado ĉe nia esperantistaro.



La 17-an de oktobro 2016, la ĉina registaro subskribis memorandon de kunlaboro kun Unesko por financi la denovan publikigon de la *Unesko-Kuriero* per 5,6 milionoj da usonaj dolaroj. La 12-an de majo 2017, la 1-a numero (aprilo-junia) de la trimonata revuo eldoniĝis en la ĉina, angla kaj franca lingvoj kun aparte 76 paĝoj. Rete troveblas nur la alvoko de Osmo Buller, la tiama Ĝenerala Direktoro de la CO de UEA, aperinta en la jaro 2000.

Ĉu ni daŭre ĵetos la mesaĝajn bombojn al Unesko aŭ kunlaboros por eldoni ĝin en Esperanto?

Nova espero videblas en la anonco *“UEA serĉas tradukantojn kaj provlegantojn por Unesko-Kuriero”* el la Gazetaraj Komunikoj n-ro 684, fare de UEA la 23-an de majo. Laŭ iniciato de la UEA-komitato Trezoro Huang Yinbao, pretiĝis eksperimenta eldono de la Kuriero en Esperanto. La teknika laboro okazis en Ĉinio, sed pri la tradukado kaj redaktado kunlaboris homoj el diversaj landoj. Post la anonco, pli ol 30 esperantistoj el 20 landoj partoprenis en la tradukado kaj provlegado. Kortuŝe!

Dank’ al internacia kunlaboro, kaj financa kontribuo de Esperanto-Centro Ora Ponto (Ĉinio), la 1-a numero de *Unesko-Kuriero* en Esperanto eldoniĝis. Nun la ĉefa bezono estas tradukantoj. Se vi regas Esperanton je nivelo C1 aŭ pli alte, se vi ŝatas interesan kaj defian traduklaboron, kaj se vi povas regule disponigi vian tempon por tia kunlaboro, bonvolu skribi rekte al la projekto-kunordiganto Trezoro Huang Yinbao: trezoro@qq.com.

Nun ĉiuj tradukantoj kaj provlegantoj laboras senpage. Por daŭrigi la eldonadon, ni devas finfine pagi la tradukan kaj provlegan laboradon. Nur tiel la eldonado povos esti daŭripova. Tiu kiu ne havas tempon traduki aŭ provlegi, povus kontribui per mondonaco, aŭ reklamo en reklama paĝo de la Kuriero. Pli da informo pri la kuriero aperas en la 3-a numero de *Tra la mondo*, kiu estas senpage elŝutebla ĉe <http://tra-la-mondo.esperanto-urbo.de>.

Forpasoj

Lina Gabrielli (1930-2016) mortis la 16-an de decembro en Ascoli Piceno (Italio). Ŝi estis ĵurnalisto kaj eldonisto. Esperanton ŝi lernis en 1955 kaj ŝi aliĝis al UEA en 1957, de kiam ĝis 1984 ŝi estis delegito. Ŝi gvidis multajn kursojn. Membro de Esperantlingva Verkista Asocio, ŝi redaktis kaj eldonis ekde 1962 la dulingvan bultenon *Voce de Centro Esperantista Piceno*. Ekde 1974, sub la marko



Plejado, ŝi eldonis kvardekon da altnivelaj libroj. Krom verki en la itala, i.a. biografiojn de famuloj de sia urbo, ŝi aŭtoris en Esperanto novelojn kaj poemojn: *La kombilo* (1962), *Bill kaj lazuraj okuloj* (1964), *Karnavalo* (1973), *Ni devas vivi* (1975; kun K. Walraamoen), *La ĝardeno de la urbestro* (1978), *Vivendo* (1979), *Nuancoj* (1980; kun K. Szczurek). Ŝia itallingva aŭtobiografia romano *Baci non chiesti* (2001) havas Universalan Kongreson kiel fonon. Gabrielli estis ofte premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA k.a. konkursoj. Kiel ŝatata preleganto kaj Esperanto-instruanto ŝi vizitis multajn landojn. En la 86-a UK en Zagrebo en 2001 ŝi estis elektita kiel Honora Membro de UEA.